

The
NORTH AMERICAN
ESPERANTO REVIEW



IN THIS ISSUE:

A Challenge to non-Esperantists

YOU can read Esperanto! See inside cover

Aŭtuna Foliaro

de Julio Baghy

La Nevolantulo

de Starling Doud

NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO

Marto - Aprilo • 1956

IV:2

A CHALLENGE

To the Non-Esperantist Reader

YOU can read ESPERANTO! Read the English part of this magazine, memorize the very simple grammar of Esperanto, then invest 85¢ in an Edinburgh English-Esperanto and Esperanto-English dictionary, and read the Esperanto part.

LIFE TALKS ESPERANTO

As this issue of the *Review* was on the press, *Life* (April 9 issue) appeared with an editorial based on the news of the apparent revival of interest in Esperanto in Communist countries. The article closes with a warning, in Esperanto and English, to get out our umbrellas, as a storm may come.

ARE WE MEN OR MICE?

The *Review* does not approve the umbrella philosophy. Let's face the storm!

If the Soviet Union goes for Esperanto, it is a safe prediction that the present gradual growth of interest in Esperanto will mushroom. There will be a battle of ideas, in which the international language will be more potent than the H-bomb.

The winds may blow from the East, with a rain of arguments for the communist way of life. But let's not hunt for storm cellars — or umbrellas. Let's have more American than Russian Esperantists in the argument. And may the best idea win!

The North American Esperanto Review

(*Nordamerika Esperanto-Revuo*)

Vol. 4, No. 1.

Jan.-Feb, 1956.

The Review not only permits, but invites, reprinting of material from its pages, except where special notice, such as notice of copyright, appears.

CONTENTS (English)

Get Out Of The Beaten Track . . .	Page 1
My Boss, ELNA	2
How Long Does It Take . . . ?	3
Let's Make It Simple	6
Practical Uses Of Esperanto	7
Complete Grammar and Pronunciation of Esperanto	Inside Back Cover

ENHAVO (Esperanta)

Saluton, Malsamideanoj	Paĝo 4
Niaj Verkintoj	4
Aŭtuna Foliaro (Baghy)	5
Vivi (Chomette)	5
La Nevolantulo	8
Esperanto en Norda Ameriko	12
Universala Kongreso	14
Novaj Libroj	15
Por Rimistoj	16


No material in this magazine is chosen for easy reading by beginners. That is not necessary in Esperanto. The author of "La Nevolantulo" was given a small lesson book in June, 1954. He says: "I studied, alone and without a teacher, for a few nights during one month, and immediately started corresponding with 13 persons in other countries, who do not know English. I really learned Esperanto by corresponding, with the help of my Edinburgh Esperanto Pocket Dictionary." This is "learning Esperanto the hard way", but it's a lot of fun — if you like to exercise your brain. *The Editor.*

The NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 4

Mar.-Apr., 1956

No. 2



The printing press was a wonderful invention. So were the telegraph, the radio and television. Now most of the 160 million or so of us can read the same news dispatches on the same day, can watch the same pictures and listen to the same commentators.

But don't you sometimes sort of wish you could get out of the beaten track — and have your own personal foreign correspondents in far-off lands, to tell you what ordinary people there are thinking?

It's nice to have airplanes, steamboats and such. And it's nice to have prosperity that makes it possible for so many people to use them.

But—if you travel — wouldn't it be a lot more fun to get out of the beaten track and get around among the ordinary people who live in those romantic countries you want to visit?

Learn Esperanto and

get out of the beaten track!

MY BOSS, ELNA

I like my boss. I want to tell you about him.

My boss, the publisher of the North American Esperanto Review, is the Esperanto League for North America, Inc. — ELNA, for short.

ELNA was organized about four years ago by American Esperantists who felt that a revival of interest in the international language, Esperanto, was long overdue in this country. We aim at a decentralized grass-roots movement for Esperanto, based on a maximum of activity by local groups and individuals with a minimum of control by the central organization.

ELNA has no function, no axe to grind, outside the field of promoting Esperanto. The Preamble to the Constitution of ELNA states:

“This League is part of the world-wide movement to spread the use of the International Auxiliary Language, Esperanto, and thereby advance friendly relations among all the peoples of the world.

“The League shall work freely with all persons, groups and organizations having the same objectives, and may officially ally itself with other neutral organizations having these objectives.

“The League shall forever remain neutral concerning questions of religion, politics and socio-economic theory.”

Article 201 of the Constitution states:

“Any person who accepts the objectives of this League may become a member.”

Thus, ELNA does not support, nor does it oppose, any ideology. Nor does it assume any authority over the use which may be made of Esperanto, nor over outside activities of its members. We offer equally to supporters and to opponents of any ideology a most effective tool for presenting their ideas on a worldwide basis.

And may the best idea win!

To persons who are not interested in ideological battles, we simply offer a splendid instrument for making their own lives more interesting and fruitful.

If you prefer an organization which promotes or uses Esperanto as a side issue to some special ideology or purpose, from stamp collecting to religion, you will find addresses of such organizations listed from time to time in the Review. Or the League Secretary, Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Penna., will help you locate the organization of your choice.

If you join some other organization, or none at all, ELNA wants to help you in any work for Esperanto. Of course, we'd like to have you join ELNA.

Dues in ELNA (all contributions to ELNA are tax-deductible) are \$3.00 per year, and up. Paying higher dues will give you no greater privileges in the League — except as you may feel, as we do, that it is a privilege and an honor to be able to help in this great work for world peace and understanding among the peoples of the world. I hope that you will join ELNA, because

I like my boss. I want you to be one of the many fine people who, collectively, are MY BOSS, ELNA.

Ferd. Carlson, Editor

How Long Does It Take . . . ?

THE QUESTION most often asked by the non-Esperantist who is becoming interested in the idea of learning Esperanto, is:

“How long does it take to learn it?”

No one can answer that question for you. You never finish learning the language. I have been using Esperanto, off and on, for over twenty years. I am still learning it, just as I am still learning English after more than fifty years!

On the other hand, in three weeks I learned Esperanto well enough to start foreign correspondence. This does not mean that I am a genius. You may have read in the last issue of the REVIEW a report that groups of high school students in several European countries are studying the same Esperanto course, and that arrangements have been made for them to start corresponding after the fourth lesson.

Or you might say that you “have learned Esperanto” when you are able to read material published in Esperanto. The answer, in that case, would probably be “an hour or two”, the time necessary to memorize the very simple grammar of Esperanto. When you have done this, you can immediately start reading Esperanto, consulting a dictionary (Esperanto-English) for each word-part which you do not recognize.

For example, if you want to read the children’s story “La Nevolantulo” in this issue of the REVIEW:

Having learned the grammar, you know that *ant* indicates present participle, usually represented in English by adding “ing” to a verb; *o* indicates a noun. Look up *la, ne, vol, ul* in the dictionary. Putting together the definitions and the grammatical indicators : “The Not-Wanting-to

Person”. I translated it more freely, “The I-don’t-want-to Guy”.

Now for the story: *Iam*-at some time; *loĝ* - dwell, *is* - past tense of verb; *apud* - close by; *nord* - north, *a* - adjective ending; *mal* - prefix denoting exact opposite, *riĉ* - rich, *a* - adjective ending; *arb* - tree, *hak* - chop, *ist* - suffix denoting one habitually occupied with, *o* - noun ending; *kaj* - and; *lia* - his; *edzin* - wife. There is no “a” or “an” in Esperanto, so the sentence reads: Some time lived close by a northern forest a poor treechopper and his wife.

You go on from there. My typewriter’s getting tired!

At first glance, this seems a very slow process of reading. But I found it lots of fun when I was learning Esperanto. You’ll guess many of the words from the context and from their similarity to English words. Of course, as you read more, more words become fixed in your memory, so that you don’t have to look them up. For example, even in the short sentence above, you wouldn’t look up *arb* twice.

If you know grammatical terminology, memorize the Grammar of Esperanto printed on the inside cover of this issue of the REVIEW. These rules are really simple, if you know the words. If “substantives”, “declensions”, etc., leave you cold, read the article, “Let’s Make It Simple” in this issue.

Ask your book dealer for the Edinburgh English-Esperanto and Esperanto-English dictionary. If he does not have it, look up your local Esperanto group. Or you can write to: Esperanto League Book Service, Middleton, Wisconsin, and get a copy for Eighty-five Cents. The definitions used above are taken from the Edinburgh, which I consider the handiest dictionary for beginners. HAVE FUN!

SALUTON, MALSAMIDEANOJ:

Jen kelkaj el miaj propraj ideoj pri la aktuala situacio Esperantista. Eble vi ne konsentas pri ĉiuj, sed mi almenaŭ petas de vi aŭskulton kaj komprenon...

Unue, ni demandu al ni, kiuj estas Esperantistoj? La Esperantistaro havas nur unu aŭ du komunajn kredojn: pri la taŭgeco de nia internacia lingvo, kaj eble ankaŭ pri la unueco fundamenta de la homaro. Je ĉiuj aliaj opinioj, ĉu je religio aŭ politiko, ni diversas, same kiel je aĝo aŭ haŭtkoloro. Sed ni ne dividiĝas en du kontraŭajn tendarojn — tiu ĉi de la junaj, tiu de la malaj, ekzemple — sed inter ni ekzistas tuta spektro de novnaskitoj ĝis centjaruloj. Tute same oni povas nin aranĝi haŭtkolore aŭ politike. Je ĉiu ideo ekzistas en la mondo nur du ekstremuloj, kaj ĉiujn nin aliajn oni povus aranĝi en nerompitan vicon de dekstra ĝis maldekstra flanko.

Nu, mi estas demokratia, kaj mi opinias ke unu el la bazaj ideoj de la demokratio estas paca kunvivo de malsamideanoj. Jefferson, eble, predikis ion pri tiu temo. Mi kontentas, legante ke persono aŭ grupo, kiu ne respegulas miajn proprajn opiniojn, aliĝas al Esperanto. Ĉu ili estas Hispanoj, Rusoj, aŭ Sudafrikanoj, ĉu komunistoj, faŝistoj aŭ nihilistoj, ĉu prokrede fraŭlaj aŭ poligamiaj, sufiĉas nur ke ili iĝas Esperantistoj, kaj mi pro tio kontentas.

Kial do? Mi respondas al tiu demando per alia. Kio efektive estas Esperanto? Ĝi estas lingvo, ĉu ne? Kiun Zamenhof kreis por helpi al interpopola kompreno. Ĝi estas ilo, neŭtrala same kiel interlanda telegrafosistemo. Mi opinias ke ĝi ne estas ludilo, kiun oni permesas nur al gefratoj, geamikoj aŭ gesamideanoj. Nek estas Esperantujo iuspeca paradizo, atingebla nur de la bonaj, la pravaj, la kunsentaj. Ne, kontraŭe, pere de ĝi ni esperas atingi en la aktuala mondo, se ne "sanktan harmonion", almenaŭ iom pli da kunsento. Tio

ja estas nia unusola komuna celo.

Sed se okazos interŝanĝo kaj miksaĵo de la malaj ideoj, kiujn ni jam havas en la homara konscio, kiuj venkos? Nu, mi estas optimista — kiu Esperantisto ne? Kaj plue mi konvinkigas pri miaj propraj ideoj; pri Dio, pri demokratio, pri homaj rajtoj, k.t.p. — kiu ne? En la libera merkato de ideoj, tiuj pli multe vendiĝos kaj disvastiĝos kiuj pli bone taŭgas kaj pravas. Mi ne timas pri tio. Mi nur timas ke, sen sufiĉe da kompreno, venkus iu aŭ alia malpli bona. Laŭ mi, nepre necesas ĉiam kaj ĉie pli da interkompreno — kaj precize inter apogantoj al malsamaj ideoj.

Ĉu vi malkonsentas pri iu ero de tiu argumento? Nu, aŭskultu, malsamideano, kaj komprenu...

*D-ro Ralph A. Lewin
La Jolla, Cal.*

NIAJ VERKINTOJ

D-ro LEWIN estas sciencisto ĉe la *Scripps Institution of Oceanography*.

STARLING DOUD, verkinto de "La Nevolantulo", responde mian informpeton, diras: "Mi havas nur gimnazian edukadon. Mi lernis Esperanton, dank' al Glenn P. Turner, kiu konvinkis min ke eblas lerni ĝin, kaj donis al mi malgrandan lernolibreton. Mi studis Esperanton, sola kaj sen instruisto, kelke da noktoj dum unu monato, kaj tuj komencis korespondadon kun 13 alilandanoj el la "Nordamerika Koresponda Servo". Mi lernis Esperanton per korespondado, kun helpo de mia Edinburgh Esperanto Pocket Dictionary.

"Mi neniam verkis ion ajn antaŭe, krom por amuzi miajn amikojn kaj por infanoj. Mi komencis studi je Junio, 1954."

Aŭtuna Foliaro

Foliaro, flirte danca,
en koloroj centnuanca,
prujnmordite ventpelate
ŝvebas ĉie: kampe, strate . . .
Ĝi kuniĝas, jen dissaltas
tie sinkas, tie haltas
por susuri, sible plendi,
jen funebre por silenti . . .
poste supren . . . ek pro blovo,
sed sencele kaj sen povo
ĝis ĝi ĉesas kirle krozi
kaj ariĝas por ripozi,
kuŝi kiel morta garbo
sub soleca seka arbo.


Julio Baghy, 1956

VIVI

Vivi estas strebi
Al la bon' kaj belo
Kaj sin mem oferi
Por merita celo.
Vivi estas grimpi
Krutan la montaron
Kaj destinon iri
Ne timante baron.
Vivi estas marŝi
Pri l' estont' pensante
Kaj la flamon gardi
Ne malesperante.
Vivi estas ami
Per la tuta koro
Kaj senlace peni
Ĝis la lasta horo.

Charles Chomette

“Vere, mia konvinkigo estas, ke sen literaturo Esperanto neniam estus atinginta tiun vivantecon, kiun ĝi nun havas kaj la plua evoluo literatura garantias ĝian vivkapablon daŭran kaj malfermas eĉ neantaŭvideblajn perspektivojn por la estonteco de la lingvo. Krome nur nia literaturo povas bone solvi kaj akceli la problemojn pri *kvanto* kaj *kvalito*. Konscia Esperanta verkisto neniam devas forgesi pri tio. *Julio Baghy*”



Esperanto-klaso en San Diego Evening School. Dirk Brink, instruanto, staras dekstre.

Let's Make It Simple

“**Y**OU SAY that ESPERANTO is simple, Ferd. But those sixteen rules don't seem simple to me! Why don't you translate them into language an ordinary mortal can understand?”

My friend's criticism is, I suppose, justified. The rules were made for grammarians. Most people forget the technicalities of grammar as soon as they can after leaving school. So, if you have forgotten what a “substantive” is, etc., this is *for you!*

Basically, Esperanto is as simple as *a, e, i, o, u*. Most Esperanto words consist of:

1. One or more word-roots, giving the meaning.
2. A grammatical ending, showing the relation of the word to other words in the sentence.

For the meaning of the roots, you must learn them, or use a dictionary, just as with any other language. But the number you must learn is much smaller than in a language lacking the logical structure of Esperanto. Learn the grammar, as explained below, and each root learned gives you several variations, which may be entirely different words in English or other languages.

NOUNS (*name words*) end in *o* (*sano*-health); **ADJECTIVES** (*descriptive words*) end in *a*, (*sana*-healthy); **ADVERBS**: (*words which have the same relation to verbs, adjectives, or other adverbs as adjectives do to nouns*) end in *e*, (*sane*-healthily).

VERBS: (*action words*), indicating present action end in *as* (*sanas* - is, am, or are healthy); past *is* (*sanis* - was or were healthy); future *os* (*sanos* - will be healthy); infinitive (*expressing no definite time relation*) *i* (*sani* - to be healthy); imperative (*command, request or suggestion*) *u* (*sanu*-

- be healthy!); conditional (*the “if” form*) *us* (*sanus* - would be healthy).

PLURAL (*more than one*): No difference in verb. Add *j* to a noun to indicate plural. Add *j* to an adjective applied to a plural noun or pronoun. (*bonaj libroj* - good books)

ACCUSATIVE: (known in English grammar as the objective case): Where the verb indicates action by the subject to someone or something (known as a transitive verb), the object of the action is indicated in Esperanto by adding *n*. (*Mi vidis lin* - I saw him. *Min vidis li* - He saw me.) Notice that you do not need to follow the English word order (subject - verb - object) in Esperanto sentences, with the accusative. Adjectives carry the accusative ending if their nouns have it. (*Mi skribas longajn leterojn* - I write long letters.)

Do *not* use the accusative after prepositions, as we do in English. “To him” would be *al li*, not *al lin*. But use the accusative to indicate an omitted preposition, as in: *La hundo saltis sur la tablon* - The dog jumped on (to) the table. Without the accusative, the sentence would indicate that the dog (being already on the table) jumped.

PARTICIPLES are action words used as adjectives. That is, you may identify a man as tall, dark and handsome. These are ordinary adjectives. Or you may identify him by reference to something he is doing, has done, or is going to do. These are active participles. You may also identify him by something done to him. (Examples below.)

The tense (time) indicators on these verbs-turned-adjectives are always in relation to the time of which you are speaking. For example: (next page)

Li estis skribanta - He was (at that time to be identified as) writing; *Li estis skribonta* - He was (at that time to be identified as) going to write. Etc.

Notice that, in line with the consistently logical nature of Esperanto, the vowel indicators of time relation in the participles follow the pattern of the simple verbs.

	<i>past</i>	<i>present</i>	<i>future</i>
simple verb	is	as	os
active participle	inta	anta	onta
passive participle	ita	ata	ota

Active forms (examples): *skribanta* - writing; *skribinta* - having written; *skribonta* - going to write.

Passive forms: *skribata* - being written; *skribita* - already written; *skribota* - going to be written.

The rest of the material in the sixteen rules is covered in the Edinburgh Dictionary in definitions of words, or is so simple that even I understood it on sight.

But I must mention my gratitude to Zamenhof for putting in the Sixteenth Rule! An apostrophe may be used instead of the noun ending *o*, or the *a* of *la*. This drops one syllable, which is very convenient to me in making up those little rhymes which you find scattered here and there in the *Review*. But don't drop the *o* if the noun is plural or accusative. (That makes it tougher for us rhymesters!)

Now, if you have acquired an Edinburgh dictionary (Eighty-five cents at the Esperanto League Book Service) or some other good Esperanto-English dictionary, you can go ahead and read Esperanto!

HAVE FUN!

Write for Free Book List

Esperanto League Book Service
Middleton, Wisconsin

PRACTICAL USES OF ESPERANTO

The UEA Delegate

A unique and very important service is available to Esperantists through the Delegate system of the Universal Esperanto Association.

The 1955 Yearbook of UEA listed 2027 Delegates, in over 1100 cities and towns, in 62 countries. The 1956 Yearbook will show more than 40 added in the U.S. alone.

Do you want to know what the job opportunities are in Sandakan, Borneo?

Are you in business, and thinking of establishing a branch in Curitiba, Brazil?

Are you trying to locate a missing uncle, last heard from in Opava, Czechoslovakia?

Do you intend to travel abroad and want advance arrangements for contacts in London, Paris, Rome, Helsinki?

Or do you think it would be more fun to "get out of the beaten track" and get acquainted with people in smaller towns?

Write to the Delegate there.

Of course, you must write in Esperanto. You must be a member of UEA, and you must pay any expense involved.

Each member of UEA receives, with his yearly dues card, a set of stickers showing that he is a member for the current year. When he wants to use the Delegate service, he finds the Delegate's address in the Yearbook and writes to him in Esperanto, enclosing a UEA sticker and an international reply coupon, and awaits results.

Read the March Issue of

HOLIDAY

"The most modern magazine in America"

(Free Adv.)

La Nevolantulo

de Starling Doud



Sam loĝis apud norda arbaro malriĉa arbhakisto kaj lia edzino. Ĉiutage la malriĉa viro eniris la arbaron por haki arbojn de mateno ĝis nokto. Li gajnis malmulte da mono, sed ili vivis tre ŝpareme kaj eblis rezervi iom da mono je ĉiu semajno.

Naskiĝis al la geedzoj du filoj. La unua filo estis tre forta kaj fortika, sed bedaŭrinde la dua filo estis tre eta kaj delikata. La unua filo estis tre serioza, simila al la gepatroj, kaj li laboris tre volante de post kiam li havis tri jarojn. Sed la dua filo estis ĉiam tre gaja kaj feliĉa kaj, ĉar li estis tre eta kaj delikata, neniu postulis ke li laboru. La unua filo estis nomita "Johano" kaj la dua nomita "Joel".

La tempo pasis, kaj ĉiuj el la familio laboris tre energieme de sunleviĝo ĝis post la mallumiĝo — kun escepto de Joel. Joel nur ludis la tutan tagon kun la bestkuldantoj, kiujn li lernis ami.

Fine, tamen, je unu sunbrila tago, ĵus post kiam Joel havis sep jarojn, la arbhakisto diris al sia edzino, "Mia kara, ĉu vi ne opinias, ke estas la tempo por lernigian etan Joel-on labori?"

"Jes, edzo," konsentis la edzino, "kaj tion mi faros hodiaŭ."

La arbhakisto tiam eliris al la arbaro, kaj la virino vokis la etan bubon.

"Joel! Venu ĉi tien!" Ŝi metis la etan bubon sur siajn genuojn, kaj kisis lin. "Kara," ŝi diris, "hodiaŭ vi devos labori."

"Labori!" ekkriis la bubo. "Mi ne volas labori."

"Joel, mia karulo," diris la bona virino mallaŭte, "ĉiuj devas labori. Se via patro ne laborus, ni malsatmortus. Ĉu vi volas nutri la kokojn?"

"Ne!" estis la respondo. "Mi ne volas."

"Ĉu vi trinkigos la kokojn?"

"Mi ne volas."

"Kion vi volas fari, Joel?" demandis la patrino.

"Mi volas ludi, Panjo," la bubo diris kun dolĉa rideto.

Kaj ĉar dolorigis la virinon puni la etan bubon, ŝi ne haltigis lin, kiam li elkuris por ludi en la plenaero.

Li ludis kun la hundo kaj la kato, kun la bovido kaj la ĉevalo. Li observis la formikojn. Li rigardis la birdojn. Li rigardis la nubojn kaj imagis ke li vidas homojn kaj bestojn en ili.

Tiun nokton, kiam la patro revenis hejmen, li tuj vokis al la knaboj. Kiam ili staris antaŭ li, li demandis, "Johano, kion vi laboris hodiaŭ?"

Johano respondis fiere, "Mi melkis kaj gardis la bovinojn. Mi sarkis la ĝardenon. Mi nutris kaj trinkigos la kokojn. Mi portis la akvon por la domo."

"Bonege!" diris la patro. "Kaj Joel. Kion vi laboris hodiaŭ?"

“Mi nur ludis, Paĉjo,” diris la eta bubo.
“Vi ludis!” ekkriis la patro. Li rigardis sian edzinon. “Kio okazis? Ĉu vi forgesis, ke hodiaŭ nia eta Joel devus labori?”

“Ne. Mi ne forgesis,” respondis la edzino, “sed li ne volas labori, kaj dolorigus min puni lin.”

“Nu!” kriis la arbhakisto, “Tio ne dolorigos min.” Kaj li ekprenis sian rimenon kaj batis la knabon malindulge.

En la mateno, la patro vokis al sia eta filo, “Joel, hodiaŭ vi devas labori. Nun mi reiras al la arbaro, sed kiam mi revenos vespere, mi esperas ke vi estos lerninta labori. Adiaŭ!” Kaj la patro eliris.

Ree la patrino vokis, “Joel! Venu ĉi tien!” Ree ŝi metis la etan bubon sur siajn genuojn kaj kisis lin. “Hodiaŭ vi devus labori. Ĉu vi volas trinki la kokojn?”

Ree la bubo respondis, “Mi ne volas.”

Pro tio, ke dolorigus ŝin vidi sian filon punata, ŝi petegis lin, “Bonvolu diri al mi, kara fileto, kion vi volas fari. Ia ajn laboro estos bona.”

“Mi volas nur ludi, Panjo,” ridetis la bubo dolĉe.

Do, la eta bubo ree ludis la tutan tagon en la plenaero kun siaj bestkunludantoj.

Je la sunsubiro, la patro revenis el la arbaro. Ree li vokis al siaj filoj kaj, kiam ili staris antaŭ li, li demandis, “Johano, ĉu vi laboris hodiaŭ?”

“Ho, jes,” fiere ekkriis la knabo. “Mi laboris multe.”

“Bone!” diris la patro. “Nu, Joel, kion vi laboris hodiaŭ?”

“Mi nur ludis, Paĉjo,” diris la eta bubo kun larmo.

“Kion!” ekkriis la patro. “Kial vi ne laboris?”

“Mi ne volis,” protestis la bubo.

“Vi estas mallaborema! Vi, nevolantulo!” kriegis la patro, kaj li ree ekprenis sian rimenon kaj batis la etulon malindulge.



Johano

Je la sekvanta tago, la patro reordonis ke la knabo laboru, kaj ree la bubo ne volis, kaj ree la patro batis lin malindulge.

Ĉi-afero daŭris senĉese dum sekvantaj monatoj, ĝis fine la bubo ne plu sentis la batadon. Lia haŭto iĝis nesentema. Kiam la patro batis lin, li jam ne ploris.

Fine, je unu nokto, post kiam la filoj enlitiĝis, la arbhakisto diris al sia edzino, “Edzino, mi timas ke nia eta filo estas sentaŭgulo.”

“Ne! Ne!” ekkriis la bona virino. “Joel estas bona knabo. Kiam li havos pli multe da jaroj, li laboros pli multe.”

“Mia karulino,” diris la edzo mallaŭte, “Mi scias ke vi amas la etan bubon multe, kaj ankaŭ mi, sed dorlotita infano fariĝos sentaŭga viro.”

“Eble vi pravas” ekĝemis la virino.

Do, ili interkonsentis ke, post ĉi-tempo, ili ne plu faros ion ajn por la mallaborema knabo.


Je la mateno, Joel ellitiĝis, lavis sin, kaj iris al la tablo por la matenmanĝo. La gepatroj kaj Johano jam estis manĝintaj, sed ne estis iaj nutraĵoj por Joel.

“Panjo!” ekkriis la surprizita bubo. “Kie estas mia manĝo?”

La patrino rigardis lin. “Vi ne volas labori, do mi ne volas kuiri por vi. Se vi volas manĝi, kuiri por vi mem.”

Kompatinda Joel. Li ne scias, kion diri.

(daŭrigo sur sekvanta paĝo)



Jen leter-kest-o de ni-a klient-'.
Kial ĉe ĝi tia ĝoj-a kontent-'
"Jen por la Mastr-o la nov-a Revu-'
Plezur-a leg-ad-o dum hor-o aŭ du."

● **ESPERANTOFONO** is the new 45 rpm unbreakable phonograph record which contains a detailed presentation of the phonetic system of Esperanto both by individual sound and by connected sentences of prose and poetry. Prose spoken by Prof. Dalmau, member of the Academy of Esperanto; poetry (*La Espero* and *La Vojo*) declaimed by Catalan poet Vila. Complete price only \$2.98 including postage and printed text of contents. Allow about 4 weeks for delivery. Order now from R. C. MARBLE, P. O. Box 2081, VAN NUYS, CALIF. or direct from BELPOST, APARTADO 5164, BARCELONA, SPAIN.

LEARN ESPERANTO

VIA AŬTOMOBILO Reklamas Esperanton

kiam ĝi portas reklamstrion (bumper strip) ĉi tian. Fluoreska verda koloro "lumas" en la mallumo. Mendu po 20c, 6 por \$1 aŭ 12 por \$2. Esperanto-Societo de San Diego, Box 4367, San Diego 4, Calif.

PORTU LA VERDAN STELON

LA NEVOLANTULO (*el antaŭa paĝo*)
Li sidas sur seĝo, pensante. Fine li diris, "Panjo, mi multe amas vin, sed mi ne scias kuiru. Ĉu vi volas instrui min?"

"Jes, mi instruos vin," respondis la patrino, ridetante, "sed unue vi devas promesi al mi ke vi lavos la nutraĵojn. Ĉu bone?"

Joel rigardis sian patrinon momente, sed la malsato baldaŭ konvinkis lin, kaj li konsentis.

La patrino uzis ĉi tiun sistemon la tutan tagon, kaj finfine eta Joel estis laboranta — sed ne multe.

Post kelke da tagoj okazis, ke la vestaĵoj de eta Joel iĝis tre malpuraj.

"Mi petas vin, Panjo," diris la bubo, "lavu miajn vestaĵojn. Ili estas malpuregaj, kaj mi ne povos iri al la urbeto kun vi kaj Patro sabate se mi ne havos purajn vestaĵojn."

"Jen la ŝapo, kaj en la puto estas la akvo," respondis la patrino. "Lavu vian vestaron."

"Mi ne volas." diris la bubo.

"Nu!" ŝi respondis, "Via vestaro restu malpura kaj vi restu hejme."

Ree, Joel sidas kaj pripensas. Fine li eliris al la puto por la lavakvo.

II

La jaroj pasis, kaj finfine eta Joel faris ion alian ol ludi — sed ne tre multe. Dum Johano kaj la gepatroj laboris de ŝunleviĝo ĝis post la sunsubiro, Joel faris nur tiom, kiom necesis kaj plaĉis al li. Li ĉiam nutris kaj trinkigis la bestojn, ĉar li amis bestojn. Ifoje li kolektis berojn aŭ sarkis la ĝardenon. Sed ĉiam ajn li havis tempon por mallabori, rigardi birdojn kaj la nubojn en la ĉielo, kaj varmigi sin per la sunbrilo. Liaj kunuloj estis la bestoj, kaj je ĉiu tago li ludis kaj parolis kun ili.

Kompreneble, la patro ne estis kontenta pri eta Joel. Unu tagon, li vokis la etan (*daŭrigo sur sekvanta paĝo*)

LA NEVOLANTULO (el antaŭa paĝo)

bubon al si kaj diris, "Joel, kial vi ne laboras pli multe?"

"Mi ne volas," diris la bubo.

"Vi ne volas!" ekkriis la patro. "Vi, nevolanta, mallaborema knabo! Vi neniam estos riĉa."

"Mi ne volas riĉiĝi, Patro," diris la bubo, "se mi ne povas ĝui la vivon."

La patro koleris. "Vi, sentaŭgulo! Eliru, kaj faru vian laboron."

La tagoj pasis, kaj Joel restis la sama nelaboranta, feliĉa knabo. Tiam, subite, unu tagon, la patro malsaniĝis. La kuracisto venis, sed la arbhakisto ne resaniĝis, kaj post unu semajno li mortis. La kuracisto diris ke la viro mortis pro trolaborado.

Je la vespero, post la enterigo, la familio sidis apud la tablo, pridiskutante familiajn aferojn.

"Kompatinda Paĉjo," ploregis la patrino. "Li laboris tre energieme por ni, kaj nun li estas mortinta de trolaborado."

"Ne ploru, Panjo," konsolis Johano. "Estas certe, ke nia Joel ne mortos per la sama maniero."

"Vi mokas min!" kriis Joel. "Mi ne volas morti de trolaborado, kaj kial mi devus? Laŭ mia opinio, ĉiuj el vi laboras tro multe. Vi ne havas tempon por la beleco en la vivo. Homo ne naskiĝas nur por labori kaj morti." Li paŭzis momente. "Panjo, kiom da mono la patro postlasis?"

"Nur ses mil, filo," ŝi diris. "Li ne iĝis riĉa, malgraŭ la trolaboro."

"Nu!" kriis Johano, kun sarkasmo. "Kial interesas vin tio, eta Joel? Vi verŝajne ne meritas iom da mono."

"Mi ne deziras iom ajn," mallaŭte respondis Joel. "Mi nur deziras ke nia patrino elspezu la monon por si mem, tiel ke la vivo estos pli facila kaj agrabla por ŝi, kaj tiel ke ŝi ne ankaŭ mortos de trolaborado. Paĉjo estis bona viro, sed ŝajnas al mi, ke li vivis nur por labori. Kian uzon

havas mono post kiam oni estas mortinta kaj enterigita? Venu kun mi, Panjo, kaj ni rigardu la belegan sunsubiron. Vidu la birdojn. Ĉu ili ne estas belaj?"

La familio eliris kaj rigardis la belecon ĉirkaŭ si. Fine Johano diris, "Joel pravas, Panjo. Vi ne devus labori tiom multe. Joel kaj mi volas fari ĉion ajn, kio necesas."

Joel rigardis sian fraton. "Ankaŭ vi laboras tro energieme, Johano," li diris. "Ne iru al la arbaro morgaŭ. Helpu min ĉi tie, kaj posttagmeze ni fiŝkaptu. Ĉu bone?"

Johano rigardis la ĉielon. "Eta frato," li diris, "Mi fine komprenas la kialon, ke vi estas ĉiam tiel feliĉa. Vi pravas. Patro ja laboris tro energieme. Morgaŭ ni fiŝkaptu."

Joel kisis sian patrino. "Ne ploru, Panjo," li diris. "Patro estas mortinta, kaj ni sentos ĉiam la foreston de li, sed ĉu li ne vivis kiel viro en malliberejo? Eble, finfine, li estas libera. Libera kiel la birdoj, kiujn vi vidas — jen. Eble li estas feliĉa nun. Ĉu vi samopiniis?"

La patrino ridetis, kaj iom da doloro foriris el ŝia koro. "Mi ĉiam diris al la patro, ke vi estas bona knabo." Kaj tiam ŝi eniris la domon.



Iuj diras, ke nia estas sankta afero. Eble ili pravas. Mi ne volas argumenti pri tio. Iuj diras, ke ni devus porti longajn vizaĝojn, ne ŝercu pri la sankta afero. Ili malpravas!

Marŝado kun kanto pli rapidas. Ĝoja laboro pli facilas. Esperanto estu ĝojiga afero.

KANTU ! RIDU ! ĜOJE ANTAŬEN !

ESPERANTO EN NORDA AMERIKO

SAN DIEGO, CAL.

En la klaso por komencantoj troviĝas pli ol dudek lernantoj, kiuj havas vigan intereson pri la internacia lingvo.

Ses membroj el San Diego veturis al Los Angeles kaj ĉeestis la kunvenon de la tiera grupo je la 10a de Marto.

LOS ANGELES

Pli ol 30 venis al la februara kunsido. La Klubo nun konsideras eblan luadon de pli granda kunsidejo.

S-ano Forrest J. Ackerman parolis en kaj pri Esperanto per KABC kiam oni lin intervjuis en la programo "Meet a Celebrity" la 1an de Aprilo.

S-ro Ackerman estas specialisto en la kampo de sciencfikcio, aŭtoro kaj agento por verkistoj en tiu branĉo de literaturo.

SEATTLE, WASH.

La Societo Esperantista de Seattle nun havas novan sidejon: 3231 West 62nd St. Telefono HEMlock 5637. S-ano Jay Berry instruas malgrandan klason. Kunkantado en Esperanto, kun muziko de piano, akordioneto kaj ukelelo vigligas la kunsidojn.



LASTMOMENTAĴO!

S-ro Norbert Cormier, fervora studanto ĉe Dirk Brink en San Diego kaj instruisto de gimnastiko, starigis Esperanto-klason dum marto en sia lernejo, Marston Junior High School, San Diego. 60 gelernantoj ĉeestas! La lernejestrino tre favoras la aferon. Jam diversaj gepatroj telefone alvokis por esprimi sian aprobon.

TORONTO, KANADO

La Toronto-Klubo anoncas kunsidojn ĉiuvendredajn, je 8 p.m., University Settlement House, 23 Grange Road.

Prelegoj pri diversaj temoj aldonas intereson al la kunsidoj. *Sekvinda ekzemplo por ĉiuj grupoj!* La Viceprezidantino lerte tradukis, dum legado, interesan veran historieton el estona libro. S-ro T. Bozilov mensincite prelegis pri psikologio. Vizitanto el Irlando pridiskutis diversajn aspektojn de la vivo en tiu lando. Li donis al la ĉeestantoj turismajn broŝurojn pri Irlando, inter aliaj unu en Esperanto.

LONDON, ONT., KANADO

F-ino M. R. Impanis, nova delegito en London, antaŭe estis delegito en Belgujo.

ESPERANTO EN NORDAMERIKAJ GAZETOJ

La gazeto *Holiday*, kiun oni nomas "la plej moderna gazeto en Ameriko", en sia marta numero, prezentis longan artikolon pri Esperanto. La verkinto estas D-ro Mario Pei. Kompreneble do la artikolo estas bonege verkita. Antaŭ la artikolo aperas tutpaĝa bildo de D-ro Pei ĉirkaŭata de Esperantaj libroj. La artikolo daŭras tra kelkaj paĝoj, kaj prezentas prononcadon, gramatikon kaj konversaciajn frazojn.

La Volusia (Fla.) *Star* prezentas serion de Esperanto-lecionoj verkitan de S-ano George E. Wagner.

ĈU VIA GRUPO

kunkantas Esperante? Ĉu vi prezentas prelegojn, teatraĵetojn, aliajn interesaĵojn por vigligi klubon kaj klasojn?

ĈU AŬTUNA KONGRESO?

La Estraro de ELNA nun konsideras aŭtunan Kongreson, post la Universala. Atendu anoncon en la junia Revuo.



Pri donac-o-j tut-kor-as la dank-o,
Ĉar ĉiam ekzist-as ja manko-o
Da mon-' por aĉet-'
De nov-a kliŝ-et-'
Je paper-o mal-plen-as la ŝrank-o.

Armin Doneis \$25

Helen Larson 5

POR PLI BONA REVUO

SPERTAJ INSTRUISTOJ: Verku por la Revuo artikolojn konsilajn al ni amatoroj, por ke niaj klasoj sukcesu!

NI ĈIUJ DEZIRAS pli bone koni niajn gesamideanojn. Adrian Hughes proponas redakti serion de artikoloj pri niaj membroj. Superŝutu lin per materialo! Adreso: 476 S. Bailey Ave., Hillsboro, Oregon.

DESEGNISTOJ HELPU! Bildoj religas, amuzas, allogas. Mi faras laŭ mia kapablo, sed ne estas bona desegnisto. Kiu povas desegni ilustraĵojn por la Revuo?

LA REVUO ESTAS BONA VARBILO se vi aĉetos paketon (15 por 60¢, 30 por \$1) por disdoni al gekonatoj. Ĉar mi ne povis plenumi la mendojn februarie, mi presis ekstrajn ekzemplerojn ĉifoje. Ili ankaŭ elĉerpiĝu!

ESTU PARDONEMAJ al la Redaktoro. La kompatinda nespertulo, pro manko da tempo, faras fuŝojn kaj erarojn, ne skribas leterojn, ktp. Tamen, ni ne maldungu lin nun. Li senpage presas, do ŝparas monon.

ĈU NOVA MONDFORUMO?

Plej novricevitaj informoj el orienta Eŭropo indikas eblon, ke la gvidantoj en tiuj landoj ne nur permesos, sed eble tre baldaŭ instigos, revigliĝon de la Esperantomovado kaj liberan interkorespondadon kun alilandanoj.

Ni Esperantistoj ĝojas pri la apero de tia eblo. Ni ĝoje reamikiĝos kun niaj longe silentaj gesamideanoj. Ni ĝojas pri la fakto ke, se tiu eblo efektiviĝos, ĝi sendube stimulos la uzadon de Esperanto en nova mondforumo tia, kian la mondo neniam antaŭe spertis.

SED — ĉu ni usonanoj lasos la forumon tute al aliaj? Ĉu ni ne povas tiel vigligi nian movadon, ke usonanoj grandskale partoprenos la novan mondforumon per Esperanto?

Jen afero, pri kiu ĉiu Esperantisto en Usono (kaj same en Kanado) nepre devus atentigi la ĝeneralan publikon per leteroj al gazetoj, ktp. En la granda marŝo al tutmonda interkompreno, ni ne okupu voston postenon.

EN LA TUTMONDA FORUMO DE PUBLIKA OPINIO, VOĈOJ EL NIA LANDO AŬDIĜU MULTNOMBRE!

ANONCOJ

Tarifo: \$1 ĝis sep linioj. Dek procenta rabato por du- aŭ plifojaj aperoj. Petu informon pri tarifo por pli grandaj aŭ multfoje aperantaj anoncoj aŭ reklamoj.

Kristana Esperantista Ligo Internacia estas asocio de protestantaj esperantistoj. Ĝia monata gazeto DIA REGNO aperas monate, eldonate en Nederlando. Ni invitas ĉiun esperantiston aboni DIAN REGNON (\$1.40 jare) aŭ membriĝi en KELI (\$1.60 inkl. la gazeton). Informojn kaj provexemplerojn sendas la usona peranto, Donald R. Broadribb,

406 West Vermont, Urbana, Illinois.

**41a Universala
Kongreso de
ESPERANTO
Kopenhago
Danlando**

4-11 aŭgusto, 1956

Adreso: 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando.

Banko: Handelsbanken, Kopenhago.

Poŝtgirkonto: 41a Universala Kongreso de Esperanto, n-ro 97820, Kopenhago.

Kotizo: danaj kronoj 48, edzino 24, gejunuloj 16, studentoj 24. Individuaj membroj de UEA rajtas rabaton 7, edzino 3.50.

Honora Komitato: La Ĉefministro de Danlando, H. C. Hansen, akceptis esti Protektanto de la Kongreso. La Ministro por Instruado, Julius Bomholt, estas Prezidanto de la Honora Komitato.



Provizoraj prezoj de litoj:

En hotelo: Kategorio A, 20/40 danaj kronoj; kategorio B, 14/24; kategorio C, 11/16. Ĉiuj sen matenmanĝo.

Ĉe privatuloj, proks. 10 d. kr., sen matenmanĝo. En komuna loĝejo, 6 d. kr., kun matenmanĝo.

Aliĝiloj: Bonvolu peti aliĝilojn ĉe Landa Ĉefdelegito.

Kongresa Glumarko: Bonvolu mendi ĝin ĉe Landa Asocio aŭ rekte ĉe la supra adreso de la Kongreso.

Infana Kongreseto: Esperanto-parolantaj infanoj ĝis 13 jaroj povas partopreni.

Fakaj Kunvenoj: Kristana Esperantista Ligo Internacia, Druivenstraat 32, Den Haag, Nederlando; Internacia Asocio de Poŝtmark-kolektantoj, petu informon ĉe Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pa.; Akademio de Esperanto, Oostduinlaan 32, Den Haag, Nederlando.

VI LEGAS ĉiutage en via gazeto pri nacio kaj ŝtato, suvereneco kaj federalismo, diplomatio, Homaj Rajtoj, UN, UNESKO, kaj Eŭropa Konsilantaro.

VI DEZIRAS, ke juro kaj justo regu inter la homoj kaj inter la popoloj. . . .

VI JAM ESTAS INFORMITA, ke UNESKO akceptis rezolucion pri Esperanto. . .

SED ĈU VI FAKTE SCIAS

kio precize estas UN, UNESKO, federalismo kaj kion vere signifas tiuj kaj multaj aliaj konceptoj kaj nuntempaj ideoj?

KLARAN RESPONDON VI TROVOS

**EN LIBRO, SKRIBITA SPECIALE POR VI, POR ĈIU ESPERANTISTO
AKTUALAJ PROBLEMOJ de la NUNTEMPA INTERNACIA VIVO**
de

Prof. D-ro Ivo Lapenna

Originale verkita en Esperanto de brila stilisto kaj mondkonata aŭtoro, la libro "majstre instruas kaj instigas al pensado" (*Scienca Revuo*).

Prezo \$1.50


Eldonita en Rotterdam 1952

Mendu jam hodiaŭ

ĉe ELNA aŭ ĉe

Universala Esperanto-Asocio
Eendrachtsweg 7, Rotterdam C,
Nederlando

Novaj Libroj



La Literaturoj de Ĉiuj Landoj Estas Viaj per Esperanto!

Tartarin de Taraskono: 187 paĝoj, tre taŭge ilustrita de Lucien Guézennec; eldonas Heroldo de Esperanto. Gld. 6.60

Jen la plej amuza libro de post "Kredu Min, Sinjorino". "Tartarin de Taraskono", verkita franclingve de Alphonse Daudet, esperantigita de Jean Delor kaj Paul Le Brun, estas nepra legendaĵo por tiuj, kiuj ŝatas ventroridi anstataŭ rideti pro libro legata.

Ĉi tiu rakonto pri blago kaj misaventuroj jam longe estas fama, sed mi neniam legis ĝin ĝis ĝi aperis esperante.

Legu kaj ridu!

KOREKTO

La libro "They Shall Not Hurt Nor Destroy", anglalingve verkita de Mary Hostetler Murray, estas eldonata de Vantage Press. La Revuo erare diris ke ĝi estas de Vanguard. Se vi havas, kiel mi, nostalgiajn memorojn pri tiuj longaj vesperoj de argumentado pri la problemoj de la mondo, vi ŝatos ĝin,

Ĉiu Esperanto-grupo devus havi la fonografdiskon de UEA. Salutparoloj de reprezentantoj el 23 landoj al la 40a Universala Kongreso. 45 RPM.

HEROLDO DE ESPERANTO

DUONMONATA INTERNACIA
ORGANO DE LA ESPERANTO-
MOVADO

Prezoj:

Abono tutjara -----\$4.00
Abono julio-decembro ----- 2.00
Abono subtenanta ----- 8.00
Anonceto po 25 vortoj----- .50

Nordamerika peranto:

Donald E. Parrish
328 West 46th Street
Los Angeles 37, Calif.

la Praktiko

LA GAZETO DE LA MONDPOPOLO

Monata internacia ilustrita revuo

Prezoj:

Jarabono (nur por kalendara
jaro) kun membreco en Uni-
versala Ligo: \$2.00
Anonceto po 25 vortoj: .50

Nordamerika peranto:

Donald E. Parrish
328 West 46th Street
Los Angeles 37, Calif.



OR RIMISTOJ

(POETOJ NE LEGU !)

Novaj Rimistoj de la Revuo

Duane kaj Suzanne Walter prezentas, laŭ muziko de "John Brown Had a Little Indian":

ETAJ VERDAJ STELOJ

Jen unu eta verda stelo,

Jen unu eta verda stelo,

Jen unu eta verda stelo,

Unu eta verda stel-o.

Unu eta, du etaj, tri etaj steloj,
Kvar etaj, kvin etaj, ses etaj steloj,
Sep etaj, ok etaj, naŭ etaj steloj,
Dek etaj verdaj stel-oj.

Dek etaj, naŭ etaj, ok etaj steloj,
Sep etaj, ses etaj, kvin etaj steloj,
Kvar etaj, tri etaj, du etaj steloj,
Unu eta verda stel-o.

Bona kanto por infanoj, aŭ por lernantoj, kaj vigliga por grupkantado. Ĉu via grupo kunkantas Esperantajn kantojn?

ALVOKO AL ĈIUJ RIMISTOJ !

Ekprenu la plumojn ! Ataku la paperon ! Ni bezonas novajn kanteblajn rimojn, aŭ eĉ nekanteblajn, sed amuzajn. Ne forgesu, ke ofte tre sukcesaj kantoj estas preskaŭ sensencaj. Fakte, se vi verkos tro bele kaj altsentimente, vi estos poeto, kaj ne rajtos lokon en nia ekskluziva malaltfrunta rondo "Rimistoj de la Revuo".

Ĉu vi povas fari anglalingvajn rimojn propagandajn por Esperanto? Ekzemple:
A senior who lives in Oshkosh
And a cute little Viennese frosh
Are swapping ideas as sweet as you please.
They use Esperanto, by gosh!

Freŝdata Fotografajo de la Redaktoro



Jen redaktor-o de ni-a gazet-o.
Li vol-as instig-i vi-n al rid-et-o.
Ni ĉiam vigl-ig-u per rid-o kaj kant-o,
Ĉiam antaŭ-e-n por Esperant-o.



Ni serĉas la novajn adresojn de tiuj, kiuj transloĝiĝis kaj pro tio ne ricevas la Revuon. Helpu nin trovi la perditajn.

PORTU LA VERDAN STELON !

Por plezuraj horoj

Invito al Ĉielo	\$1.50
Kredu Min, Sinjorino	1.65
Gaja Leganto per Esperanto30
Rozoj kaj Urtikoj	1.60
El la Maniko	1.80
Koko Krias Jam	1.80
Kontralte	1.80
Atakoj Kontraŭ Ĝardenplantoj ...	3.00
Murdo en la Orienta Ekspreso35
Fundamenta Krestomatia	3.00

Esperanto League Book Service
Middleton, Wis.

NIA AFERO BEZONAS VIN
VETURU ZORGE !

Complete Grammar, Alphabet and Pronunciation of Esperanto

THE ALPHABET

a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.

The sounds of the vowels (a, e, i, o, u) are the vowel sounds in: "Are there three or two?" The consonant sounds are as in English, except: *c* as *ts* in *hats*, *ĉ* as *ch* in *church*, *g* as in *go*, *ĝ* as *g* in *gem*, *ĥ* as *ch* in *loch*, *j* as English *y*, *ĵ* as *z* in *azure*, *s* as in *so*, *ŝ* as English *sh*, *ŭ* as English *w*.

THE GRAMMAR

1. There is no indefinite article; there is only a definite article (*la*) alike for all sexes, cases and numbers.

2. Substantives end in *o*. To form the plural, *j* is added. There are only two cases: nominative and accusative; the latter is obtained from the nominative by adding *n*. Other cases are expressed by prepositions (genitive *de*, dative *al*, ablative *per*, etc.)

3. The adjective ends in *a*. Case and number as for substantives. The comparative is made by means of the word *pli*, the superlative by *plej*; with the comparative the conjunction *ol* is used.

4. The fundamental numerals (not declined) are: *unu*, *du*, *tri*, *kvar*, *kvin*, *ses*, *sep*, *ok*, *naŭ*, *dek*, *cent*, *mil*. Tens and hundreds are formed by simple junction of the numerals. To mark the ordinal numerals, *a* is added; for the multiple, *obl*; for the fractional, *on*; for the collective, *op*; for the distributive, the preposition *po*. Substantive and adverbial numerals can also be used.

5. Personal pronouns: *mi*, *vi*, *li*, *ŝi*, *ĝi*, *si*, *ni*, *vi*, *ili*, *oni*; possessives are formed by adding *a*. Declension as for substantives.

6. The verb undergoes no change with regard to person or number. Forms of the verb: time *being* (present) takes the termination *-as*; time *been* (past) *-is*; time *about-to-be* (future) *-os*; conditional mood

-us; imperative mood *-u*; infinitive *-i*. Participles (with adjectival or adverbial sense): active present *-ant*; active past *-int*; active future *-ont*; passive present *-at*; passive past *-it*; passive future *-ot*. The passive is rendered by a corresponding form of the verb *esti* (to be) and a passive participle of the required verb; the preposition with the passive is *de*.

7. Adverbs end in *e*; comparison *as* for adjectives.

8. All prepositions govern the nominative.

9. Every word is pronounced as it is spelled.

10. The accent is always on the next-to-last syllable.

11. Compound words are formed by simple junction of the words (the chief word stands at the end). Grammatical terminations are also regarded as independent words.

12. When another negative word *is* present, the word *ne* is left out.

13. In order to show *direction toward*, words take the termination of the accusative.

14. Each preposition has a definite and constant meaning; but if the direct sense does not indicate which it should be, we use the preposition *je*, which has no meaning of its own. Instead of *je*, we may use the accusative without a preposition.

15. The so-called foreign words (that is, those which the majority of languages have taken from one source) undergo no change in Esperanto, beyond conforming to its orthography; but with various words from one root, it is better to use unchanged only the fundamental word and to form the rest from this in accordance with the rules of the Esperanto language.

16. The final vowel of the substantive and of the article may sometimes be omitted and replaced by an apostrophe.


Learn
Esperanto
now!



It's
the language
of the future

ESPERANTO-BY-MAIL, 123 East 35th Street, Brooklyn 3, N. Y.

JUST PLAIN



THIS MAGAZINE IS THE OFFICIAL ORGAN
OF THE

Esperanto League
for North America, Inc.

If You Like The Review, You'll Like The League.

Why not Join Us Now?

Regular Member	\$ 3.00
Man and Wife	4.00
Supporting Member	5.00
Patron	10.00
Life Member	50.00

Membership includes subscription to the Review. All contributions to the League are tax-deductible. Review subscription alone, \$1.75.

Mail application and payment to:

Esperanto League for North America, Inc., Somerton 16, Pa.